

Martin Gotthard Schneider,
Vivojn sep mi volus havi

tradukita de Adolf Burkhardt

Vivojn sep mi volus havi.
Kia beno, kia riĉ'!
Tio por deziroj ĉiuj
estus rava plenumig'.
La unuan mi eluzus,
sxip-stiristo, kapitan',
por la vastan mondon vidi,
veli sur la ocean'.

En la dua vivo min en
cirko kovrus klaŭna vest',
kaj admirus ĉiuj min, dre-
siston de sovaĝa best'.
En la tria, politike
estus mi tre grava hom',
ĉiutage inter Moskvo
flugus kaj la Blanka Dom'.

Film-stelulo, kanzonisto
estus mi en vivo kvar;
ŝikajn aŭtojn, belajn inojn
mi posedus sen avar'.
Kaj por helpi la homaron,
en la kvina vivo mi
estus kuracisto fama
en tre alta pozici'.

...

Sesa vivo: ĉio nuna
 estis nura bagatel'.
 Kosmonaŭto mi fariĝos,
 flugos inter lun' kaj stel'.
 En la sepa vivo - nu, mi
 kio povus esti plu?
 Certe venos la ideo,
 speciala, sen tabu'.

Vivojn sep mi volus havi.
 Mi ricevis unu por
 sole tiun ĉi travivi,
 antaŭ ol ĝi flugis for.
 Tiu unu, mia, nun, kun
 ĝojo, trist', plezuro, dev' -
 ke ĝi estu bona vivo -
 jen sincera mia rev'.

*Traduko de la Germana poemo "Sieben Leben möcht ich haben" de MARTIN GOTTHARD SCHNEIDER (*1930-04-26) en Esperanton de ADOLF BURKHARDT (pastro, *1929-04-10 - †2004-04-02).*

Arg-962-1939 (2014-01-10 18:35:57)

Pri la tradukinto vidu la retejon http://de.wikipedia.org/wiki/Adolf_Burkhardt.